N I A V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
. lunde vespere (91) 5 30 87 98 * fax (91) 5 71 08 52
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz SEPTEMBRO-OKTOBRO 1994

**MALAGA KONGRESO** ***(Pedro Garrote)***

MEL estis reprezentita por sia vic-prezidanto en la kunveno de lokaj grupoj kaj en la HEF-asembleo. Entute 6 MEL-anoj ĉeestis la Kongreson. Luis Ojer prelegis pri "Problemoj de supersignaj literoj en komputilo kaj eblaj solvoj"

*Ne multaj esperantistoj ĉeestis la jaran tutlandan kongreson. Kiel kutime la gejunularo estis preskaŭ nevidebla. Spite tion ĝi estis fruktodona. Ene de la sidejo, bela kaj alloga, la tiel nomata "Centro Cívico", proksime al la strando, oni parolis pri multaj aferoj diverstemaj: disvastigado de esperanto, fortigo de HEF, financoj, organizaĵoj, homoj (stabanoj, oficistoj), instruado, ekonomio, ktp.*

*Estas malfacile en eta raporto informi pri la tuta kongreso, sed ĝenerale mi diros ke la plej ĉefaj temoj estis jenaj:*

*Instruado.- Oferti kursoj kiel eble plej profesiecajn (pagatajn). La kurso devus havi, minimume, 40 horojn.*

*C.O..- La Centra Oficejo prenos sur sin grandan parton de la laboro de la esperanta movado tutlanda, por informi al la esperantistoj kaj helpi ilin kiel eble plej bone kaj rapide.*

*Ekonomio.- Oni povas gajni monon kun esperanto. Kelkaj esperantistoj asertas ke ili havis la eblecon labori en esperanto (tradukado) kaj oni pagis al ili. En la revuo "Monato" oni povas vidi reklamojn de diversaj entreprenoj en esperanto. IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) fondita en 1985 kaj ekde 1994 faka asocio apartenanta al UEA. Ĝia prezidanto estas Franz Josef Braun.*

*Politiko.- ERA (Esperanto Radikala-Asocio). Ĉi tiu asocio apartenas al la Radikala Partio (la Radikala Partio estas transnacia), kaj la esperantistoj devus apogi ĝin, ĉar nun ĝi estas ege aktiva kaj prezentas multajn dosierojn favore al esperanto al la malsamaj instancoj de la Europa Unio. Se ne individue, almenaŭ grupe, ili meritas nian apogon.*

**NOVAJ VORTAROJ**

En la Malaga Kongreso Luis Ojer prezentis sian projekton por eldoni tri novajn vortarojn de esperanto. Temas pri du volumoj: esperanto-hispana kaj hispana-esperanto kaj unu tria kiu nomiĝas: Etimologia vortaro de esperanto. La aŭtoro, emerita profesoro de universitatoj en Usono kaj Venezuelo kaj profesia tradukisto de la angla kaj la franca, faris grandan laboron speciale ene de la etimologia elveno de esperantaj vortoj.

**FUNDACION ESPERANTO**

La fondaĵo de HEF eldonis, kune kun la Viena eldonejo Pro-Esperanto, la libron "Glaŭka lum'". Geje 88 p. antologio de poemoj originalaj kaj tradukitaj. Petu al Libroservo (Apdo 119. 47080 Valladolid)

**KAMAĈO TRADUKITA**

Dum la itala kongreso de scienfikciuloj, FACON94, prezentiĝis la itala-esperanta libro "La lingua fantastika" (Eldonejo Keltia-Aosta) konsistante ĉefe en la italigo de dudeko da originalaj esperantaj rakontoj, inter ili de Georgo Kamaĉo. La libron ricevis en la kongresa dokumentujo la plej multo de la partoprenantaro: Oni do povas aserti ke la ĉefa celo de la eldonaĵo estas sciigi al la itala scienfikcia mondo ke esperanto ekzistas, vivas kaj viglas.

Ankaŭ aperas originala scienfikcia rakonto de Kamaĉo en la libro "Sferoj 9", eldonita de la Grupo NIFO.

**RADIO VATIKANO**

Laŭ la lasta programo de "Radio Vaticano" la esperantaj elsendoj estas jenaj:

Dimanĉoj kaj festotagoj 21,20 (Duoninsula horo) Meza ondo: 527-1530. Mallonga ondo: (75/49m) 3945/5882-MN (41m) 7305-E

Ĵaŭde 7,10 (Duoninsula horo) Meza ondo: 1611. Mallonga ondo: (75/49m) 6185-A (41m) 7365-A

**AUGUSTO CASQUERO**

La honora prezidanto de MEL kaj lia familio translokiĝis al Slovakio. Ekde septembro ili vivos en esperanta etoso dum kelkaj monatoj. Ni deziras al ili feliĉan restadon kaj ne frostan vintron en la montara regiono. Adreso: Budovatel'skà 3224/15. Spiĉskà Sobota. 058 01 Poprad (Eslovaquia)

En majo Augusto partoprenis en la Semajno de la Hispana Kulturo kaj lingvo kiu okazis en Bydgoszcz (Pollando), kadre de la 10-a Internacia Simposio de Monda Turismo.

## UNESCO KAJ ESPERANTO

Gian Carlo Fighiera (HdE nº10/94) klarigas ke UNESCO ne akceptis rezolucion pri Esperanto en 1993. Post diversaj konsultoj al UNESCO kaj al la Pariza Konstanta Reprezent-Oficejo de Italio ĉe UNESCO li konkludis ke al la itala projekto de rezolucio 27 C/DR.373, proponita en la kadro de la provizora tagordo de la novembra Konferenco, la Ĝenerala Direktoro aldonis jenan noton:

*1.- La celo de la disvastigantoj de Esperanto koincidas kun tiuj de la Organizo, kiam temas pri konkreta faciligo de la kompreniĝo kaj komunikado inter popoloj kaj homoj, klopodante samtempe elimini la potencialan fonton de nunaj kaj estontaj konfliktoj ŝulditaj al opoziciantaj pens-maniero kaj malsimilaj esprim-manieroj.*

*2.- La Ĝenerala Direktoro apogas la proponon en ĝia principo kaj faros sian eblon por doni al ĝi sekvon en la kadro de la projekto "Linguapax" (27 C/5,par.05220) kaj eventuale en la kadro de la Programo pri partoprenado, surbaze de specifaj petoj, kiuj estus prezentotaj de la interesitaj Ŝtatoj membroj.*

La 5-a Komisiono ricevis proponon de Italio, sed konsideris ke la aldonita noto de la Direktoro ne bezonas politikan decidon: tial la Komisiono "notis" (kio en diplomatia lingvo signifas konstati la ekziston de dokumento, sen preni pozicion pri ĝi). La itala projekto de rezolucio ne eniris la definitivan tagordon.

Kion signifas la noto de la Direktoro?. Ĝi signifas ke li atendas konkretajn petojn de la Ŝtatoj-membroj (politikaj instancoj), kiuj havas aŭtoritaton indiki al li politikan linion.

UEA kaj naciaj esperanto-movadoj nun devas konvinki la respektivajn naciajn Unesko-Komisionojn prezenti klarajn petojn en la kadro de la programo "Linguapax"

## HEF ANGULO aŭ MEL sugestas

Por la Asembleo de Malago MEL prezentis projekton de 1995-HEF-buĝeto.

## KONGRESOJ

.--Pro manko de aliĝantoj ne okazos la 1-a Seminario "Esperanto: Kulturo kaj socio". Rasismo kaj ksenofobio en la nuna Eŭropo. Paterna (Valencio).

.--En 1996 okazos en Valencio "Eŭropa Esperanto-festivalo"

.--15an-22an oktobro. 2-a Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-Semajno. Centro Borja. Sant Cugat del Vallés. Informoj: Kultura Sekcio de Hispana Esperanto-Muzeo. Poŝtkesto 15027-08080 Barcelono.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º

Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. _is la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson: (91) 446 80 79

19-a septembro "Malaga kongreso". Ronda tabulo de partoprenantoj.
17-a oktobro. Prelego de L.Ojer "Venezuelo.Kariba perlo"
14-a novembro. Prelego. C. Suárez "Malsupreniĝi maŭren"

## CAMACHO _EFROLAS

Georgo kunĉefrolas la filmon "Sexo oral" kaj ankaŭ aperas en la propagand-resumo kiu anoncas la filmon en diversaj kinejoj. Sen dubo li estas "Amikino" (nomo de la sekcio pri kino kiun li ofte subskribas en la revuo Monato)

## SEGOVIO

La Publika Biblioteko kiun la Aŭtonoma Komunumo "Castilla y León" havas en Segovio, dank' al klopodoj de segoviaj esperantistoj aboniĝis al "Monato". Antaŭen segovianoj!.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::